Provizora regularo pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»

La regularo devas esti aprobita aŭ abolita de sekva Konferenco de REU.
Ĝis tiu okazos, la Estraro provizore uzas ĝin por kuranta agado.

1. La fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» (plue — la Fonduso, la Vortaro) estis establita de la 29-a Konferenco de REU (06.-07.08.2017, urbo Poŝeĥonjo).
2. Celo de la Fonduso — monhelpi al la teamo de la Vortaro en ĝia laboro pri la Vortaro kaj pri la paĝaro de la Vortaro. La monhelpo okazas per akumulado de mondonacoj.
3. La Fonduso ne estas uzebla por aliaj celoj.
4. La Fonduso pleniĝas per donacoj de apartaj esperantistoj, Esperanto-organizaĵoj, ceteraj simpatiantaj personoj.
5. Listoj de kontribuintoj al la Fonduso estas regule publikigataj en la paĝaro de REU kaj en la Bulteno de REU.
6. Donaco al la Fonduso fareblas per pago al kasisto de REU. Paganto devas nepre informi la kasiston, ke la pago destinitas al la Fonduso.
7. REU regule transdonas la tutan akumulitan en la Fonduso monon al la teamo de la Vortaro (ne malpli ofte ol ĉiun duonjaron, escepte de okazoj, kiam sumo en la Fonduso estas nula). La transdono okazas per ĝiro laŭ monsubtenaj pagmanieroj, indikitaj en la paĝaro de la Vortaro.
8. La Fonduso povas esti malfondita per decido de la Konferenco de REU aŭ per decido de la Estraro de REU, aprobita de la Konferenco de REU.